# Kiel s-ro USIKUBO fariĝis go-profesiulo?

Mi naskiĝis en jaro 1947 en urbo KOUTI {, Japanio}. Eble pro manko da manĝaĵoj, ne kreskis bone. Nuntempe estas alta 160 centimetrojn kaj peza 48 kilogramojn. Feliĉe estas sana escepte malvarmumas de tempo al tempo.

Ŝatis tradiciajn ludojn kiel kartoludojn kaj tabulludojn. Sed ne ĝuis ilin, ĉar ĉiam venkis, kaj ekvolis ludi iun ludon, kiun infano povas ludi kun plenkreskuloj.

Mia patro estis komercisto kaj amatora go-ludanto malforta je 10 KYUU. Lia amiko venadis hejmen kaj ludadis goon kun mia patro. Mi 8 jaraĝa observis iliajn ludojn kaj lernis goon. Sekve komencis vizitadi go-klubon, postludadi go-matĉojn publikigitajn sur ĵurnalo, solvadi go-problemojn. Estis instruita de kelkaj amatoraj fortuloj, inkluzive gubernian ĉampionon 4 DANnan amatore.

Unu aŭ du jaroj post komenco estas la periodo kiam oni plej interesiĝas pri goo. En go-klubo mi fortiĝis po 1 rangon en ĉiu monato. En turniroj, venkanto ricevis premion, tio estis ĝojo. Mia naskiĝloko KOUTI estas fama, ke oni trinkas multe da SAKE {japana alkoholaĵo}, do multfoje mi gajnis botelon da SAKE. Kiam estis en 3a jaro de elemanta lernejo {9-10 jaraĝa}, estis fama kiel infana goisto en la gubernio. Kiam estis en 4a jaro de elemanta lernejo, ludis kun {posta profesiula majstro} 林海峰 RIN KaiHou. Li estis 6 jarojn pliaĝa ol mi, tiam jam 3 DANa profesiule kaj tre promesplena. Kun 6 anticipemetitaj ŝtonoj feliĉe mi venkis la ludon.

En 6a jaro de elemanta lernejo, havis ŝancon por veni al OOSAKA {due plej granda urbego en Japanio} kaj ludi kun profesiul-kandidato en KANSAJa Go Instituto. La instruisto estis KARIYA Kei (9 DANa profesiulo, nun retiriĝis). Li estis el KOUTI kaj ŝajnis forte interesiĝi pri mi. Ludis blankon kontraŭ 3 KYUUa profesiul-kandidato, kaj venkis lin kun efektivigo pli ol vera forto. Vidante la ludon, instruisto KARIYA diris, “Tuj fariĝu profesiul-kandidato!”

Je 3 monatoj antaŭ fino de lernado en elementa lernejo, mi transvenis al OOSAKA urbego kaj fariĝis profesiul-kandidato. Mia vivo estis decidita vole nevole, ne pensis ke mi estas promesplena aŭ ne kiel profesiula goisto.